# Arto~ŝoko



## Unika lingvokurso-programo

surbaze de la vivo kaj arto de la granda pentristo

## Vincent van Gogh.

La kurso celas evoluigi la kompren- kaj parolkapablojn, sed ekzercigas ankaŭ gramatikajn elementojn. Oni riĉigas sian vortostokon rilate al arto, naturo, filozofio, sed ankaŭ pri malsano, geografio, astronomio kaj pri ĉiutagaj temoj.

---

Kadre de la kurso oni partoprenas ilustritajn prelegojn, solvas komprenekzercojn, diskutas, faras rolludojn, aranĝas vivpentraĵojn, rolas en aŭkcioj, detektivas pri falsigoj, tradukas tekstojn, priskribas pentraĵojn, ĉiĉeronas en artgalerioj (veraj kaj kreataj de ni).

**Instruas: Katalin KOVÁTS**

Por partopreni oni bezonas neniun artotalenton, eĉ ne speciale kompreni kaj ŝati Van Gogh – tio venos dum la kurso!

---

Kadre de la programo ni enrigardas ankaŭ en la koncernan - kaj el arthistoria vidpunkto tre gravan - periodon, traktas verkojn de aliaj pentristoj.

---

La partoprenantoj estas petataj kunpreni unu el siaj ŝatataj pentraĵoj (ankaŭ kopioj taŭgas☺), pentritan en la 19a jarcento.

La programo estas farebla ankaŭ en heterogena grupo, sed la kandidatoj estu **minimume komencintoj.**
Eĉ progresantoj ne enuos!

---

La tempodaŭro de la kurso povas varii ekde semajnfina kurso (6-16 horoj) ĝis plursemajna seminario. Inter la unuopaj renkontiĝoj okazas distanca studado kaj kontaktiĝo.
Se vi ŝatus partopreni aŭ organizi tian kurson por kombini lingvoekzercigon kun altnivela kulturprogramo turnu vin al Katalin.

Pri la detaloj informiĝu ĉe Katalin Kováts:
katalin@ikso.net